ESPERANTA BIBLIOTEKO INTERNACIA

N-o 32

Reinhold Schmidt

La Amkonkurantoj

Triakta komedio originale verkita

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G.m.b.H.
Berlin kaj Dresden

ESPERANTO-VERLAG
ELLERSIEK & BOREL G.M.B.H.
BERLIN KAJ DRESDEN

DU
GRAVAJ GAZETOJ

multe ŝatataj kaj tre legindaj
por ĉiu Esperantano, estas

GERMANA ESPERANTISTO

Monata gazeto por la
disvastigo de la lingvo
Esperanto, kaj

ESPERANTO-PRAKTIKO

Monata gazeto por per-
fektigo en la Lingvo
Internacia

Ĉefredaktoro por ambaŭ
FRIEDRICH ELLERSIEK

Redaktoroj: Arnold Behrendt
kaj Karl Minor

**Oni postulu specimenajn numerojn, kun-
sendante po unu nova respond-kupono**

ESPERANTA
BIBLIOTEKO INTERNACIA

No. 32

Reinhold Schmidt

La Amkonkurantoj

Triakta komedio originale verkita

Dua eldono

1923
Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H.
Berlin kaj Dresden

Alle Rechte vorbehalten.

Ĉiuj rajtoj estas rezervitaj.

Copyright 1923 by
Ellersiek & Borel G. m. b. H., Berlin.

Personoj:

S-ro Ŝupeluso

S-ino Ŝupeluso

Gertrudo, ilia filino

S-ro Fabricio, riĉa fabrikanto

Karolo Stefano, juna aktoro

Reprezentanto de **Bruno Altmonto,** reveninta juneca amiko de S-ro Ŝupeluso

Onklino Terezo

Karlino, servistino.

Sceno: en la domo de familio Ŝupeluso.

Akto unua

Bone meblita ĉambro en la domo de sinjoro Ŝupeluso. Dekstre kaj maldekstre po unu pordo. En la malantaŭaĵo du fenestroj, inter kiuj staras tableto kun trikilaro. En la antaŭa parto maldekstre tablo, sur kiu oni vidas kafujon, tasojn ktp. Ĉe la tablo du seĝoj kaj unu remburita seĝego.

Sceno unua

S-ino Ŝupeluso (metante la tasojn). Bone — nun mia maljunuleto povas veni. (Ŝi iras al la maldekstra pordo, malfermas ĝin iomete kaj vokas). Mal-junul-eto, ĉu vi volas nun veni? La kafo jam estas sur la tablo. (Oni aŭdas voki de el interne S-ron Ŝupeluson: Stande pete apostkulorum!)

(S-ino Ŝupeluso reirante al la tablo.) Stande pete apostkulorum. — Tio estas lia ĉefa kutimsentenco. Kian instruitan edzon mi havas. (Ŝi aranĝas la seĝojn. Dume S-ro Ŝupeluso eniras, portante matenan vestaĵon, ĉapeton, pantoflojn kaj fumante pipon.)

Sceno dua

S-ro Ŝupeluso. Bonan matenon, Agneso! (Li ĉirkaŭbrakas sian edzinon, kisante ŝin.)

S-ino Ŝupeluso. Bonan matenon, maljunuleto!

S-ro Ŝupeluso. Jen mi estas, patrino, — nun ni komencu.

S-ino Ŝupeluso. Jes, kara edzo, ĉio estas preta. Lasu min enverŝi por vi. (Ŝi plenigas la tasojn.)

S-ro Ŝupeluso. Jes, faru tion, patrino. Vi ŝparigas al mi penadon. (Li sidiĝas en la seĝego.)

S-ino Ŝupeluso (ridante). Mia maljunuleto fariĝas vere maljuna. Nu ja, sesdek du jarojn sur la dorso, kaj la plej multajn el ili plenaj je laboro, tio rajtigas ornami sin per la maljuneca krono.

S-ro Ŝupeluso. Hm — hm.

S-ino Ŝupeluso. Sed pro tio vi povas nun ripozi, vivante laŭ via gusto.

S-ro Ŝupeluso. Tion ni povas. Kompreneble vi kaj Gertrudo komprenas alie ol mi mem tiun „vivi laŭ gusto". Estus ankaŭ riproĉinde, se nia filino imitus en ĉi tiu rilato sian patron ne volonte elirantan. — Cetere rakontu: Ĉu estis agrable en la kantsocieto? Ĉu Gertrudo multe dancis? Certe, ĉar alie ŝi ne plu litripozus.

S-ino Ŝupeluso. Kion vi pensas? Nia laborema filino! Estas al ŝi tute neeble, tiel longe litripozi! — — Ne, ne, Gertrudo jam faris

mallongan promenadon laŭ diro de Karlino, kaj nun ŝi ŝanĝas la tualeton kaj tuj alvenos.

S-ro Ŝupeluso. Hm — hm.

(**Gertrudo** en eleganta hejmrobo eniras tra la dekstra pordo.)

Sceno tria

Gertrudo. Bonan matenon, karaj gepatroj.

S-ro Ŝupeluso. Bonan matenon, filineto.

S-ino Ŝupeluso. Bonan matenon, Gertrudo.

(Gertrudo sidiĝas ĉe la tablo kaj plenverŝas sian tason.)

Gertrudo (al la patro). Ĉu mia patreto dormis bone?

S-ro Ŝupeluso. Bonege, Gertrunjo. Kaj vi mem?

Gertrudo (ridante). Ho, se la sonĝoj ne estus estintaj! Nenion krom senprudentaĵoj. Estis certe la puno pro mia tro longa plezurĝuado. Sed tio ne ree okazos.

S-ro Ŝupeluso. Ĝis la proksima fojo. Tion mi esperas!

S-ino Ŝupeluso. Mia infano, via filozofia opinio estas sufiĉe stranga por junulino. La gracia dancturniĝo laŭ la takto muzika estas nobla plezuro; kaj, Gertrudo, pripensu, ke la ritmaj movadoj de dancoparo povas havi gravan signifon — ĉu kelka paro ne jam dancis en edzecon?

S-ro Ŝupeluso. Mirige dirite, Agneso. Oni devus distingi vin per la titolo de honora doktoro de filozofio. Sed kio koncernas tiun „endancadon en edzecon", mi — hm — opinias, ke (ridante) jam kelka viro kaj virino, kiuj elegantege endancis en la edzecon, multon fordonus, se ili povus same facile eldanci el ĝi. Danco mallonga, edzeco ofte longa estas. Esceptoj tamen valoru.

S-ro Ŝupeluso. Ĉu escepto, ĉu regulo, Gertrudo ĉiuokaze —

Gertrudo (time petante). Patrino — —

S-ino Ŝupeluso. Knabino, tio ne bezonas resti sekreto kaj ankaŭ ne povas ĝin plu, ne, ne, Gertrudo, li estas, kredu min, sincera.

Gertrudo. Sed li estas al mi indiferenta.

S-ro Ŝupeluso. Kiu estas tiu „li", Agneso?

S-ino Ŝupeluso. Kiu alia, ol la hieraŭa kun, dancanto de Gertrudo! — Eksciu, kara edzo ke ĉiuj enviis nian Gertrudon pro li.

S-ro Ŝupeluso. Nu, mi supozas, ke li estas la sukeraĵisto Krampelo aŭ la energia serĝento el la montostrato, kiu ĉiam tiel afable salutas ŝin, aŭ —

S-ino Ŝupeluso. Aŭ Aŭgusto Mulero, aŭ Frico Ŝulco. Ho, Henriko, ĉu via ambicio ne celadas pli alten?

S-ro Ŝupeluso. N—ne; ĉu li nomas sin Ŝulco, ĉu Mulero, tio estas egala al mi. Kontenta mi estas, se mi havas la certecon, ke li, tuta viro, korege amas nian filineton.

S-ino Ŝupeluso (rapide). Ho, ĉiu el liaj ekvidoj estis kiel muta amodeklaro. Kaj li posedas milionojn krom sia palacosimila domo ĉe la foirejo kaj la bela bieno en Ceseno.

S-ro Ŝupeluso. Babilulino vi! Kiam mi aŭdos la nomon de tiu riĉegulo?

S-ino Ŝupeluso (tre grave kaj triumfe rigardante sian edzon). Li estas — la fabrikanto Fa—bri—cio.

S-ro Ŝupeluso. K—i—u?

S-ino Ŝupeluso. Jes, malgraŭ via mirego. Ne estas iu dubo pri tio, ke la tre honorinda fabrikanto Fabricio brule enamiĝis en nian filinon. Liaj okuloj, ameme direktitaj al Gertrudo, sufiĉe parolis. (Al Gertrudo.) Kaj verŝajne via orelo ekaŭdis kelkan dolĉaĵon — ho, mi vin ambaŭ rigardis, kiel nur patrino zorgema tion faras.

Gertrudo (kiu dume montris sian kolereton per fingra tamburado, altenvidado kaj nazosulko). Estis sole nesignifaj frazoj, patrino. Lia amo estas nura imago.

S-ro Ŝupeluso (ekbalancante). Ĉi tiu pedantego deziras do edziĝi kun nia brava Gertrunjo, por ke ŝi mortige enuu ĉe lia flanko?

S-ino Ŝupeluso. Ne trograndigu, Henriko.

Viro, kiu parolas al la patrino de sia amatino tiel afable — serioze, kiel faris tion hieraŭ sinjoro Fabricio, certe ankaŭ en edzeco penados plenumi sian devon. Mi estas konvinkita, ke li portus Gertrudon sur siaj brakoj. La knabineto povus ludi la rolon de grafino, kaj ni gemaljunuloj mem certigus al ni per tia bofilo altan societan rangon.

S-ro Ŝupeluso. Paperlapap! — — (ridante) Sinjoro Fabricio portanta nian Gertrunjon sur siaj brakoj! — — Tion mi povis fari rilate al vi en iamaj tagoj, sed nun mi jam ne riskus ĝin. Kaj nian filinon mi taksas je cent kvardek funtoj minimume. Ho ĉielo, la bonulo teren falus sub ĉi tiu dol — — ĉa ŝarĝo.

(Gertrudo kore ridas.)

S-ino Ŝupeluso. Fi, Henriko, ne moku pri tia seriozaĵo! — — Kaj vi, Gertrudo, hontu, ke vi ridis tiel maldelikate pri la malbela ŝerco de via patro.

(Gertrudo ruĝiĝante teren rigardas.)

S-ro Ŝupeluso. Nu, trankviliĝu. Sed koncerne al via alia rimarko mi devas ankoraŭ diri, ke mi mem ne volas ludi rolon en societo kaj ke vi ne bezonas tian ludi. — — Kaj, knabineto, diru do: Ĉu vi nepre deziras vivadi kiel grafino? kun tri, kvar geservistoj ĉirkaŭ vi?

Gertrudo (petoleme ridante). Certe, paĉjo. Se mi tiam estos sinjorina moŝto, kaj vi vizitos min, vi ĉiam devos veni en frako kaj cilindra ĉapelo.

S-ro Ŝupeluso (je komika ĉagreno). Fulmtondrulino vi! — — Ĉu vi efektive kredas, Agneso, ke via fabrikanto petos la manon de Gertrudo?

S-ino Ŝupeluso. Ho, jes! (grave) Eksciu, ke sinjoro Fabricio faris al mi la sciigon, ke li permesos al si, viziti nin la proksiman matenon, tio estas do hodiaŭ, por informi sin pri la farto de sia dancistino.

Gertrudo. Min li ne ekvidos.

S-ro Ŝupeluso. Gertrunjo. Voluntum laudandas est, aŭ: oni volas laŭdinde. Lasu lin alveni. Se vi konsentas, mi vin anstataŭos, respondonte ĉiujn demandojn pri viaj korpa, spirita kaj anima statoj.

(Gertrudo ridetas. Ekaŭdante tintadon, ŝi iras al la dekstra pordo, malfermas ĝin kaj revenas kun gazeto. La patrino dume ekĝeminte stariĝis kaj metas nun la vazaron sur pleton.)

Gertrudo (donante la gazeton al sia patro, rapide unu paĝon trarigardante). Jen, patro, nova legaĵo — — Hu! Revolucio! — — Bona komenco.

S-ro Ŝupeluso. Ho, interesa ĉefartikolo. — — Ankoraŭ dankon. (Sinjorino Ŝupeluso iras al

la dekstra pordo kaj premas la butonon de la elektra tintilo, poste ŝi revenas. Dume sinjoro Ŝupeluso disfaldis la gazeton kaj trarigardas paĝon. Tre mire.) Ĉu eble?! — — Gertrunjo, jen io por vi!

Gertrudo. Por mi?

S-ino Ŝupeluso. Ankaŭ mi estas scivola. Vi legu do, Henriko, mi petas.

S-ro Supeluso. Aŭskultu: Lubeka teatra sciigo.

S-ino Ŝupeluso (malŝateme). Lubeka teatra sciigo? — — Ho, tio! — — Nun mi povas ĝin diveni.

(Gertrudo montras konfuzon.)

Ĉu indas aŭskulti ĝin?

S-ro Ŝupeluso. Vi miros, Agneso! — — Do aŭskultu ambaŭ! — —

(La servistino Karlino alvenas de dekstre.)

Sceno kvara

S-ino Ŝupeluso. Pardonu momenton, Henriko

(Li mute ekbalancas la kapon.)

Karlino. La sinjorina moŝto sonorigis. Mi opinias, ke pro la vazaro. (Sinjoro Ŝupeluso legas por si mem, pipfumante. Gertrudo iras al la tableto inter la fenestroj, por alporti la trikaĵon, kun kiu ŝi revenas al sia seĝo. Nun ŝi trikas.)

S-ino Ŝupeluso. Jes, Karlino. Vi forprenu la vazaron.

Karlino (prenante la pleton). Jes, sinjorina moŝto.

S-ino Ŝupeluso. Kaj krome, por ne forgesi ĝin, Karlino, forviŝu ankoraŭ unufoje la polvon en la salono.

Karlino (intime). Venos alta vizito; ĉu ne, sinjorina moŝto?

S-ino Ŝupeluso (grave). Jes, Karlino. Sinjoro fabrikanto Fabricio venos.

Karlino. Ho, ho! — — Kia honoro! — —

S-ino Ŝupeluso. Ĉu estas ankaŭ varme en la salono?

Karlino. Se sinjoro Fabricio kunportos varman junulkoron, tiam jes; alie — —

S-ino Ŝupeluso (riproĉante). Ne babilu tiamaniere kaj forte varmigu la ĉambron, por ke mia edzo ne malvarmumu.

Karlino. Jes, sinjorina moŝto, mi faros tion. (Ŝi eliras.)

Sceno kvina

S-ino Ŝupeluso. Nun, kara Henriko, bonvolu legi.

S-ro Ŝupeluso (legas). La hieraŭa teatra vespero alportis ĝojan surprizon al la ĉeestantaro. Pro la subita malsaniĝo de l' heroo-reprezentanto, sinjoro Bartelmio, la teatra direktoro estis en granda embaraso. Ŝajnis preskaŭ neeble, trovi

ludanton por la rolo de Markizo Poza. Jen sinjoro Stefano, junula amanto, deklaris sin preta, dirante, ke li estas zorgeme studinta la rolon. Por savi la reprezentadon, direktoro Blanko fine konsentis. — — Ĉu sinjoro Stefano plenumis sian malfacilan taskon? — — Bonege. Lia ludo ekscitis la miregon eĉ de la kritikema parto de l' aŭskultantaro, kiu ofte laŭte aplaŭdis. La realigo de la poetafiguro efektive estis malkaŝo de granda aktora talento, eble genio, kiu, ĝis nun ĉiam ludinte malgrandajn rolojn, disfaldis siajn flugilojn, por suprenflugi al la suno de vera gloro. Ktp. ktp. — — Brilege, ĉu ne?

(Gertrudo interplektis la manojn, kvazaŭ ripozante en dolĉaj sonĝoj.)

S-ino Ŝupeluso. Nu, la referanto scias laŭdi superlative.

S-ro Ŝupeluso. Recenzanto, Agneso. Referanto estas — —

S-ino Ŝupeluso (ĉagrene). Ĉiam vi volas instrui min. Sed mi vetas mian kapon, ke tion skribis bona amiko de sinjoro Stefano.

Gertrudo (riproĉe). Sed patrino, se li skribas: La tuta aŭskultantaro aplaŭdis, tio ja devas esti vera.

S-ro Ŝupeluso. Jes, jes, Agneso, vi estas nejusta kontraŭ sinjoro Stefano, ĉi tiu viro respektinda. Kiel longe li sidpremis la kontorseĝon sole

pro la malsaneta patrino! Kaj ne pli frue li elŝanĝis la skribejon por la plankoj, kiuj signifas la mondon, ol kiam oni certigis al li artistan perfektiĝon ĉe pli granda teatro. Nun li elmontris, ke li promesas fariĝi unuaranga scenejulo, kaj mi ne malpli esperas, ke li estos ankaŭ ĉiam bona filo — —

S-ino Ŝupeluso (moke). Kaj bona edzo, ĉu ne?

S-ro Ŝupeluso. Tutcerte ankaŭ tia. Estas domaĝe, ke li ne vivas plu en nia urbo. Ĉiam, kiam li vizitis nin, lia elokventeco vigligis nian familian rondon. Gertrunjo, ĉu ne?

Gertrudo (ruĝiĝante, mallaŭte). Jes, kara patro.

S-ino Ŝupeluso. Ho, tiel senpripense nutri la flamon de ŝia malsaĝa amespero! (Gertrudo iras malrapide al fenestro, remetante la trikaĵon en la antaŭan lokon. Tiam ŝi rigardas sur la straton.) Estu honorata via teatra heroo — — cetere al mi li devus ankoraŭ imponi!

S-ro Ŝupeluso. Kiel grandioze dirite! Sed eble vi ricevos okazon por tio. (Flanken.) Mi havas ideon.

S-ino Ŝupeluso. Okazon por tio? — — Mi ne scias kiel; — — sed lasu ĝin, ĉiuokaze mi estas por la financisto.

S-ro Ŝupeluso (ridante). Financisto! Sendube vi opinias sinjoron Fabricio.

S-ino Ŝupeluso (leviĝante). Memkompreneble. Kaj mi fidas al la sana sento de Gertrudo

pensante, ke ŝi fine preferos esti iam la edzino de altrespektinda, riĉega fabrikanto, ol tiu de teatrulo. Ĉar la temperamentaj ekscitoj de tia viro ne povus forgesigi al ŝi la mankon de vera koramo.

Gertrudo (turniĝante). Kion vi scias pri tio!

S-ino Ŝupeluso. Silentu, Gertrudo; la amo faras vin blinda. Sed aŭskultu: Teatrulo ne sin neas. Li preskaŭ ĉiam estas kunulo senpripensa, al kiu la amo de edzino tre ofte ne sufiĉas. (Ŝi foriras rapide dekstren.)

Sceno sesa

S-ro Ŝupeluso (ekbalancante la kapon). Tute malprava mia Agneso „in generalorum" ja ne estas. Sed Stefano, mi kredas, estas esceptulo. Mia Gertrunjo ne donas sian amon al iu, kiu ne indas ĝin.

Gertrudo (alrapidante al la patro). Dankon, mil dankojn al vi, paĉjo, por ĉi tiu vorto de amplena konfido. Jes, mi ne eraras koncerne al la sincera karaktero de Karolo; tio estas al mi certa konvinko. — Ho, patro, vi devus liajn leterojn — (ŝi vortrompas).

S-ro Ŝupeluso (aprobe ridetante). Jen elmontriĝas ama korespondado, poŝte restante?

Gertrudo (duonvoĉe). Mi ne povis rifuzi ĝin.

S-ro Ŝupeluso. Estas kompreneble. Sed ĉar mi preferas vian varmkoran multpromesantan Karolon al — nu al la alia, mi volas rapide fini vian sekretan faradon, invitonte sinjoron Stefano por la unua paska festotago. Li imponos al panjo per sia arto kaj — sed sufiĉu!

Gertrudo. Ho, estus belege, se li venus. Sed ĉu la patrino konsentos?

S-ro Ŝupeluso. Ne zorgu pri tio. Ŝi vidos reprezentadon neantaŭsente. Propter batum est.

Gertrudo. Ĉu vere? — Ho, kiel mi estus feliĉa, se vi, patreto, sukcesus gajni por mi la patrinan konsenton. — Nun nova espero plenigas mian koron. — Sed pardonu, paĉjo, estas tempo por mi, por laŭ promeso viziti mian amikinon Lucio. Tial adiaŭ, patro! (Donante al li la manon.)

S-ro Ŝupeluso (ridante). Foriru, rapide, mi diras, alie vi kuros en la brakojn de nia hodiaŭa vizitanto.

Gertrudo. Hu! Estus terure! — Adiaŭ! —

S-ro Ŝupeluso. Adiaŭ, filineto. — Ne forgesu saluti.

Gertrudo (jam dekstren elirante). Certe, neniam alie.

Sceno sepa

S-ro Ŝupeluso. Bonulino ŝi. Singardema kaj saĝa kiel tridekjara, samtempe freŝvigla kiel petolulino malgraŭ siaj dudekkvar jaroj. Plej

volonte mi havus ŝin ĉiam ĉe mia flanko. Sed ĉi tiu sinjoro Stefano scias peti — peti en la leteroj al mi. Oni ne povus imagi. Ho, se sinjorino Ŝupeluso ekscius tion! —

(**Karlino** enmetas la kapon tra la dekstra pordo.)

Sceno oka

Karlino. S-ro Ŝupeluso!

S-ro Ŝupeluso. Kie brulas?

Karlino. Ja ne brulas. Sed la sinjorina moŝto petas vin, rapidege veni en la salonon, por saluti sinjoron Fabricio. Li ĵus eliris el sia veturilo.

S-ro Ŝupeluso. Jes, Karlino, mi venos. (La kapo de Karlino malaperas.) Iru mi do, por saluti la respektindan sinjoron Fabricio!

Akto dua

Salono en la domo de sinjoro Ŝupeluso. Dekstre kaj maldekstre po unu pordo. En la malantaŭaĵo fenestroj, inter kiuj staras flortabloj kun kreskaĵoj; flanke antaŭe ronda tablo kun seĝegoj ĉirkaŭ ĝi.

Sceno unua

Gertrudo (en eleganta vesto. Ŝi iras kaj reiras malkviete. Fine haltante). Kiel dolĉe la bona patro parolis al mi, kiam li preparis sin por sia promenado. Ĉu li ne diris: Mi igos feliĉa mian Gertrudon ankoraŭ hodiaŭ? Kaj poste: Li — tiu estas mia amata Karolo — kaj mi mem, ni ambaŭ volas bone fini la aferon. (Ekĝemante.) La „kielo" restas ja sekreto por mi. Domaĝe, ke tiu sinjoro Fabricio devas nepre ĉeesti. Sed nature, ĉar la patrino nenion antaŭsentas, kaj ŝi deziras sendube, ke mi fianĉiniĝu kun li kiel eble plej baldaŭ. — Ĉiuokaze du sinjoroj kunvenos ĉe ni hodiaŭ vespere. — Ĉio estas tiel enigma. (Ŝi iras kaj reiras denove; poste.) Ĉu onklino Terezo venos? — — Espereble.

Ŝi komprenas mian sentadon. — Dio mia, kiel ekbatas la koro ĉe la penso, ke ĉio, ĉio efektive decidiĝos hodiaŭ. Nu, tion mi scias: Neniam mi fariĝos la fianĉino de sinjoro Fabricio. Se sorto malamika malebligos, ke mi apartenu al mia karega Karolo, tiukaze — tiukaze mi restos la filino de la domo Ŝupelusa.

(De dekstre oni aŭdas paŝojn sur ŝtuparo.) Mi aŭdas paŝojn sur la ŝtuparo. Unu estas tiu de l' patro, sendube; sed la alia? — Ĉu mi ne konas ĝin ankaŭ? — Ho, li venas! — Tial do la patrino devis veturi al Vilmershajno laŭ la peto de mia ruza patreto, por inviti onklinon Terezo. (Iu frapas.)

(Gertrudo iom ekscitita.) Eniru! —

(Pli laŭte.) Eniru! — (La pordo malfermiĝas. S-ro Ŝupeluso enŝovas S-ron Stefanon en la ĉambron. — Voĉo de s-ro Ŝupeluso de el ekstere.) Ĉiam antaŭen, juna amiko.

(S-ro Ŝupeluso purigas siajn ŝuojn ĉe duone malfermita pordo. S-ro **Stefano**, de li enŝovita, faras kelkajn paŝojn.)

Sceno dua

Stefano (ekvidante Gertrudon, kiu iris post seĝegon). Ho — mia kara — mia plej kara Fraŭlino Gertrudo! (Li rapidas al la fraŭlino, kies vizaĝon suna rideto eklumigas, kaj prezentas

al ŝi la manon.) Ricevu mian plej varman saluton, samtempe kun tiu de mia patrinjo.

Gertrudo (kore). Estu korege bonvenanta, sinjoro Stefano, ĉe ni. Kaj volu ne forgesi, mi petas vin, redoni mian plej afablan saluton al sinjorino via patrino.

Stefano. Tutcerte ne.

Sceno tria

S-ro Ŝupeluso (nun enirante kaj fermante la pordon) 'N tagon, Gertrunjo!

Gertrudo. Bonan tagon, patreto. Estas malvarmega vetero. Ĉu vi frostiĝis?

S-ro Ŝupeluso. Nu ja, mi ne povas nei ĝin.

Gertrudo. Ho ve! Tiukaze vi devas tuj trinki iom da varmega — eble taseton da kafo. Karlino alportu ĝin. Mi iras por diri tion al ŝi. (Ŝi iras al la dekstra pordo.)

S-ro Ŝupeluso. Lasu, infano. Kontraŭ la malvarmo mi havas plej bonan korfortigon en mia aparta kuracilujo, mian „Akvo bruliga".

Gertrudo (ridante). Ĉu vi efektive opinias, patreto? — — — Nu, bone, agu laŭ via plaĉo. (Ŝi revenas.)

S-ro Ŝupeluso (al Stefano). Pardonu al mi,

sinjoro Stefano. Eble ni revidos unu la alian nur post kelkaj horoj.

Stefano. Ho, plej respektinda sinjoro Ŝupeluso, nenian ĝenon pro mia persono, mi petas vin.

S-ro Ŝupeluso (kiu dume forpaŝis al la maldekstra pordo, turniĝante). Ĉiuokaze do: Ĝis revido hodiaŭ vespere, kiel ni fiksis. Ĉu vi komprenas? Kiel ni fiksis!

Stefano. Ĝis revido, sinjoro Ŝupeluso. Kaj mi faros ĉion, kion mi povos, por kontentigi vin, tiamaniere gajnonte la laŭdon, kiun vi donacos al mia povado. (Kun intima ekvido al Gertrudo.) Estas ja pro altega prezo. (S-ro Ŝupeluso afable ekbalancas la kapon kontraŭ li kaj volas tiam foriri maldekstren. En tiu momento Gertrudo rapidas al sia patro, ĵetas sin al lia kolo, lin kore ĉirkaŭprenante, kaj orelparolas.)

Gertrudo. Plej bona el ĉiuj patroj, dankon, mil dankojn pro — nu, vi ja scias.

S-ro Ŝupeluso (kun komika ĉagreno, duonlaŭte). Nenion mi scias, infano.

Gertrudo (kortuŝita). Ho, kian bonan patron mi havas.

S-ro Ŝupeluso. Knabineto, mi vere devas aĉete liberigi min el via ĉirkaŭpreno. — Jen kiso! (Li kisas ŝin kaj poste liberiĝas. Ruze ridetante kaj ŝerce minacante per fingro kontraŭ Stefano.) Ke vi ne risku, sinjoro, en tio imiti min! (Li foriras maldekstren.)

Sceno kvara

Stefano (post la lastaj vortoj de S-ro Ŝupeluso — por si mem). Kiel volonte mi volus ĝin.

Gertrudo (embarasita pro la patra parolo). Vi do restados ankoraŭ iomete, ĉu ne, sinjoro Stefano? — Sidiĝu, mi vin petas. (Ŝi montras seĝegon kaj mem sidiĝas sur alia; samtempe flanken.) Kiel malsaĝe mi demandas!

Stefano (sidiĝante). Mia patrineto deziras havi sian grandan knabon dum la posttagmezo, ĉar li mankos al ŝi dum la vespero. Sed malgraŭ ĉiu fila amo mi devas donaci al vi, plej kara Gertrudo, parton de l' tempo dediĉota al la patrino, por saluti vin, neĝenate per fremduloj. Plue mi volus aŭdi, ĉu vi ankaŭ deziras mian vesperan venon.

Gertrudo. Sinjoro Stefano —

Stefano. Ho, kial ĉiam ankoraŭ la ceremonia „sinjoro Stefano", kiam neniu nin aŭskultas.

Gertrudo. Sinjoro — Karolo —

Stefano. Ankoraŭ unu paŝon pli proksime al mi — Gertrudo.

Gertrudo. Ho — Karolo — ĉar vi tiel volas —

Stefano (iomete dolore). Sole, ĉar mi ĝin volas?

Gertrudo (terenvidante, poste kun rideto rigardante lin). Kaj ĉar mi — tiel volonte agas laŭ via volo, — kara — Karolo.

Stefano (rapide prenante ŝiajn manojn). Ho, mil, mil dankojn al vi por ĉi tiu vorto, mia kara, bona,

dolĉega Gertrudo: — Vi agas laŭ mia volo tiel volonte — tiam do vi ja devas min — tute iomete ami?! (Ŝi donacas al li varman ekvidon.) Jes, plej kara Gertrudo, vi amas min! — (Ŝi lin rigardas per okuloj lumantaj.) En viaj okuloj mi legas ĝin, ili malkaŝas al mi la dolĉan sekreton de via animo, kiun vi sciis ĉarmege rimarkigi en viaj leteroj al mi, por tiam ĉiam denove forviŝi la postsignojn de via koro sur la vojo al la mia. Kaj mi mem ofte deziris malfermi al vi mian koron, sed ĉiun fojon mia fiero ordonis min silenti, atendi, ĝis kiam mi estos tuta viro, artisto, pri kies povado neniu dubus. Kaj tial mi lasis vin partopreni en ĉio, kio emociis mian koron, ne permesante al tiu ĉi mem, ke ĝi parolu kun pasio pri tio, kio kvazaŭ sanktigis miajn pensadon kaj agadon. — Nu, mi vere havis belan sukceson. Mi povis forpreni branĉeton de l' arbo eterne verdiĝanta de vera arto, kaj mi kredas posedi la forton, por iam atingi ĝian plej altan supron.

Gertrudo. Jes, Karolo, vi belege sukcesis. Mi aŭdis pri tio. — Kaj nun lasu min konfesi, ke mi jam de longe amis vin per la tuta intimeco de mia estaĵo. Sed, ho, kiam la amo ĝojegis en mia koro, tiam la admiro pri la artista povado, pri la spirita grandeco de mia Karolo igis min silenta. (Dolore ridetante.) Tamen la amantino en mi ĉiam denove obstinis kontraŭ

la devo de nūra admiro, ĉar ja la amo, unuiganta en si ĉiujn noblajn sentojn, postulis sian rajton. Tial mi ne povis tute kaŝi antaŭ vi la „dolĉan sekreton de mia animo“.

Stefano (eksaltante en pasia ekscitiĝo, ĉirkaŭbrakas Gertrudon, kiu kvazaŭ per sorĉinfluo malrapide leviĝis kaj nun volas paŝi returnen, sed pro la seĝego ne povas). Gertrudo! — Knabineto! — Amatino! — Vi tute mia per amo! — Vi en mi, kaj mi en vi, tiel nia vivado ripozu sur unu sola fundo. (Li kisas ŝin.)

(Dume la maldekstra pordo estas mallaŭte malfermita, kaj la kapo de Karlino montriĝas al la aŭdantaro. Post kelkaj momentoj ŝi ree fermas la pordon.)

Stefano (lasante Gertrudon el siaj brakoj). Kaj nun, karulino, mi foriros, por ke mi preparu min por la vespera tasko. Vi ja tro bone scias, Gertrudo, ke unu persono, kara al vi, iam volonte vidis min veni en vian domon, ĝis kiam riĉegulo alproksimiĝis al vi pro sama intenco. (Ĉagrene ridante.) Nun li estas la bonvenanto. — Sed via patro —

Gertrudo (embarasite). Li diris ĉion al vi, Karolo?

Stefano. Certe, kara Gertrudo. Via patro ja konsentas pri nia edzecprojekto.

Gertrudo. Vi parolis pri vespera tasko. Kia do ĝi estas, Karolo? Mia patro faris tiel strangajn rimarkigojn.

Stefano. Ne demandu, Gertrudo. Atendu, ĝis kiam la sekreto estos malkaŝata per la cirkonstancoj hodiaŭ vespere. (Ridetante.) Ankoraŭ unu peton: Estu afabla kontraŭ iom maljuna sinjoro alvenonta.

Gertrudo (malagrable surprizita). Kontraŭ iom maljuna sinjoro? — Sed estas do — tiu sinjoro fabrikanto, kiu tute sennecese donacas al mi sian respektegon kaj ĉion alian. — Mi miras, ke vi, amato, deziras, ke mi vidigu al tiu viro pli ol ĝentilan konduton?

Stefano. Komprenu min, Gertrudo. Mi ne rigardas lin, pri kiu vi ĵus parolis, kiel „iom maljuna sinjoro". Koncernas du diversajn personojn.

Gertrudo. Ki—el? — Sed, Dio mia! — Kiu li estas? — Vi certe venos, ĉu ne?

Stefano. Hm. — Jes kaj ne.

Gertrudo. Vera oraklo-respondo.

Stefano. Sole tion mi ankoraŭ diras: Mia Gertrudo certe ekkonos min ankaŭ tiam, kiam mi volos resti nekonata por aliaj.

Gertrudo. Ho — nun mi opinias kompreni Ĉiuokaze mi sekvos la ĝustajn postsignojn.

Stefano. Vi do provizore kontentiĝos pri mia iom maljuna sinjoro — mi diras „provizore", plej kara Gertrudo?

(Ŝi kompreneme ekbalancas la kapon. Ĉe la vortoj: „Vi do provizore" sube en la domo forte

sonoras, kaj ĉe la vortoj: „plej kara Gertrudo“ ankoraŭ unu fojon pli laŭte.) Nun adiaŭ, ĉarmulino! (Li ŝin kisas sur la frunton.)

Gertrudo. Mi iras kun vi malsupren. Karlino ŝajne ne aŭdas la sonoradon.

(Ili ambaŭ foriras dekstren. Gertrudo, fermante la pordon, malsupren vokas.) Mi venas! (Tuj poste **Karlino** eniras tra la maldekstra pordo, alportante vazon kun floroj.)

Sceno kvina

Karlino (metante la vazon sur la tablon). Karlino ja aŭdis la sonoradon. Sed kiel malfermi la dompordon, ne ofendante maldekstre la indecon de sinjoro Ŝupeluso prenanta medikamenton, kaj dekstre ĝenante la geamantojn? — Dank' al Dio, ke mi restis trankvila okaze de la ĵus vidita sceno. Ne mankis multe, ke mi aliformiĝis en salkolonon. Tiu petolema fraŭlino Gertrudo! Fianĉiniĝas subite kun tiu ĉi sinjoro Karolo! Nu, li ja estas beletulo kaj, laŭdire, estonta teatra stelo. Sed la ekvidon mi neniam forgesos. (Ŝi metas ambaŭ brakojn ĉirkaŭ la vazo kaj levas ĝin.) Tiel li faris — tiel! (Ŝi premas la vazon kontraŭ sia brusto, sopire suprenrigardante.) Gertrudo — belulino — amatino de mia koro! — Venu al mia fidela brusto! — Kaj fraŭlino Gertrudo estas persistema. Alvenu eĉ dek Fabricioj por postuli

ŝin ĉiu por si. — Jes, jes: sinjoro fabrikanto, vi ne atingos vian celon. (lomete malestime.) Tio ĉi tie (montrante la vazon) estas donaco de Fabricio por „lia“ belulino, mi devas meti ĝin en la salonon, ĉi tien, por ke fraŭlino Gertrudo ne bezonu rigardi ĝin, kiam la familia festeno okazos en la ordinara ĉambro. Ho, mi estas scivola, kiamaniere la afero disvolviĝos.

Akto tria

La sama ĉambro kiel en la unua akto. Onklino Terezo sidas ĉe tablo, kovrita per tuko, kaj okupas sin per trikaĵo. Sur la tablo staras hele lumanta lampo. En la kameno gaja fajro.

Sceno unua

Onklino Terezo. Jen preskaŭ maŝo perdiĝis. Estas pro la multaj pensoj. Sed kia surprizo ankaŭ! (Ĉesigante la trikadon.) La fabrikanto Fabricio volas do edziĝi kun mia kara nevinjo! — Kiamaniere la bona Agneso laŭdis ĉi tiun „feliĉon“! „Ho, li estas respekteginda sinjoro — havas milionojn en la poŝo, posedas urban palacon, grandan farmbienon — ho, estas sendube brilega edziĝpropono por la knabineto.“ — Nu, mi ja sciis respondi: „Milionoj ne estas malŝatindaj, eĉ se estus nur kelkaj. Monon oni ĉiam povas uzi, multe da mono ankoraŭ pli bone.“ — La palaco kaj la farmbieno havas ankaŭ sian valoron. Sed la viro, Dio scias ĝin, estas vera maljuna „papao“.

(Denove trikante.) Neniu neos tion. Jes, li estas maljuna „papao“, kiun la manio por eterna virineco ne plijunigas. Sed ĉar li ne povas posedi ĉiujn belajn fraŭlinojn, kun kiuj li dancis kaj ametis dum la lastaj tridek jaroj, li fine por unu decidiĝis, por nia karega Gertrudo. — Kaj ŝi mem? — Ĉu ŝi ne amas alian? Tiun sinjoron Stefano? Mi aŭdis, ke li fariĝas pli kaj pli eminenta teatrulo. — Tre bone; estas nur domaĝe, ke tiuj sinjoroj „de la scenejo“ estas devigataj, image ami ĉiun vesperon alian sinjorinon. Tio ne povas havi bonan efikon rilate al la edziĝmoralo. Alie sinjoro Stefano estas ja multpromesanta bonulo. Ĉiuokaze mi opinias, ke li valoras esti preferata al „papao“ Fabricio. (Metante la trikaĵon sur la tablon.) Agneso verŝajne ankoraŭ tualetas. — Sed Gertrudo? Ŝi certe ne deziros ornami sin por la maljuna amanto. — Kie do ŝi restas? — Ŝupeluso nun ankaŭ povus veni.

(**Karlino** eniras de dekstre, alportante grandan plusan tablotukon.)

Sceno dua

Karlino (surmetante la tukon anstataŭ la uzita, dum kiam onklino Terezo prenas la lampon). Permesu, mi petas, onklino Terezo. La sinjoro fabrikanto tuj alvenos. (Prenante la lampon el la manoj de onklino Terezo.) Bonan dankon ankaŭ.

— Ĉu fianĉiĝo okazos ĉe ni ankoraŭ hodiaŭ? Kaj kun kiu? Fraŭlino Gertrudo havas pli ol unu adoranton. Ho, mi estas treege scivola. Kion vi opinias, onklino Terezo?

Onklino Terezo (iom kolerete). Mi opinias, ke vi farus bone, se vi zorgus en la kuirejo, ke la punĉo ne elpotiĝu.

Karlino (korege ridante). Ho, onklino Terezo, kian humoron vi havas! — Vi ne bezonas maltrankviliĝi pro la punĉo. Mi nur pli malfrue alportos ĝin.

Onklino Terezo. Sed certe, Karlino. Mi kompreneble ne volis diri, ke estas necese, tuj komenci per punĉado.

Karlino. Ho, jes, kompreneble. (Elirante.) Antaŭe ja gajaĵo devas okazi.

Onklino Terezo. Tiu arogantulino! — Sed fidela ŝi estas. (Oni aŭdas de dekstre paŝojn. La pordo malfermiĝas.)

Voĉo de s-ino Ŝupeluso. Eniru, mi vin petas.

Voĉo de Fabricio. Antaŭe vi, respektindulino.

Voĉo de s-ino Ŝupeluso. Se vi nepre persistas pri tio — (S-ino **Ŝupeluso** eniras la scenejon, Fabricio ŝin sekvas.)

Sceno tria

S-ino Ŝupeluso (al onklino Terezo, kiu leviĝis). Plej kara — permesu, ke mi prezentu al vi sinjoron fabrikanton Fabricio, kiu faros al ni

la honoron, restadi vesperan horon en nia simpla familia rondo.

Fabricio (rigide kliniĝante). Mia respektatulino — mia plej respektinda sinjorino —

Onklino Terezo. „Ŝtonkapo".

Fabricio. Ha, dankon. Plej respektinda sinjorino Ŝtonkapo, mi estas eksterordinare ĝojigita pri tio, ke mi ekkonas en vi novan membron de la altestiminda familio Ŝupeluso, treege de mi ŝatata.

S-ino Ŝupeluso (grave). Cetere ĉiuj homoj nomas mian karan fratinon familiece onklino Terezo.

Onklino Terezo (agrable ridante). Estas vere, sed ne havas multe da intereso por sinjoro la fabrikanto.

Fabricio (fervore). Ha, kontraŭe — jes. Tio sonas tiel intime, tiel familiare. Se vi, ha — (S-ro **Ŝupeluso** eniras de maldekstre. Li estas vestita per eleganta hejmĵaketo.)

Sceno kvara

S-ro Ŝupeluso (bonhumore). Bonan vesperon, sinjoro Fabricio. Kiel vi fartas? (Li prezentas sian manon al Fabricio, kiu, rigide kliniĝante, prenas ĝin.)

Fabricio. Bonan vesperon, tre estimata sinjoro Ŝupeluso. Dankon ankaŭ pro afabla demando.

Nu, oni ja fartas sufiĉe bone. Estas espereble tiel same ĉe vi, kaj cetere ankaŭ ĉe la tuta respektinda familio?

S-ro Ŝupeluso. Ni devas esti kontentaj pri nia saneco. Ĉu ne ankaŭ vi opinias tion, Agneso?

S-ino Ŝupeluso. Se ne anoncus sin miaj kapdoloroj de tempo al tempo —

S-ro Ŝupeluso (bonhumore). Ĉi tiun malbonaĵon kaŭzas via rentulina vivado. Mi mem nun atendas la podagron, havante la rilatan aĝon. (Ridante.) Vi, sinjoro Fabricio, ankoraŭ ne atingis ĉi tiun aĝon, por tiu ankoraŭ mankas al vi kelke da jaroj.

Fabricio (iom embarase). Ha — vi estas ankoraŭ bonaĝulo, koncerne la podagron.

S-ino Ŝupeluso (fikse rigardante sian edzon, al Fabricio). Mia kara edzo estas nur tro dorlotita, de kiam li ĝuadas la feliĉon, ripozi de multjara laborado. Kaj bedaŭrinde mankas al li via freŝeco, sinjoro fabrikanto.

S-ro Ŝupeluso. Por tio mi ja posedas tro multe da vastkorpeco, kiun mi dankas al via troega zorgo pri mia fizika bonstato, kara edzino. — Vi vidas, sinjoro Fabricio, ke en kelka rilato estas bone, ne havi edzinon.

Fabricio (embarase ridetante). Ha — nu — tamen —

S-ino Ŝupeluso. Bonvolu la gesinjoroj sidiĝi, mi petas. Kara Henriko, ĉu vi ĉi tie prenos lokon? (Flanke de onklino Terezo, kiu ankaŭ nun sidiĝas.) Sinjoro Fabricio, ĉu mi povus peti vin, preni ĉi tiun seĝon? (Apud la alia longa flanko de la tablo.) Nun ankoraŭ sole Gertrudo mankas por plenigi nian modestan rondon. (S-ro Ŝupeluso prenas la seĝon apud la dua mallarĝa flanko.)

S-ro Ŝupeluso. Jen ankoraŭ unu seĝo restas neokupita. Domaĝe, ke Gertrudo ne invitis sian amikinon Lucio Braun por hodiaŭ vespere.

Onklino Terezo. Vere, tre domaĝe. Ŝia gajeco ĉiam ĝojigas nin ĉiujn.

S-ro Ŝupeluso. Cetere mi renkontis sinjoron Stefanon hodiaŭ posttagmeze. (Al Fabricio.) Lertega aktoro, nun okupata ĉe la teatro en Altona. Antaŭtempe li volonte vizitis nin. (Sinjorino Ŝupeluso riproĉe rigardas sian edzon.)

Fabricio. Ha — jes? — Interesa novaĵo por mi.

S-ro Ŝupeluso. Mi ankaŭ petis lin, ke li venu ĉi tiun vesperon, sed li respondis nek „jes“ nek „ne“. Mi vere ne sciis klarigi al mi lian konduton.

S-ino Ŝupeluso, Li certe dediĉos la malmultajn festotagojn, kiujn li povas pasigi en nia urbo, al sia malsaneta patrino. — Kaj krom tio, sinjoro fabrikanto, eksciu, ke mi ne volonte estus salutonta sinjoron Stefanon,

malgraŭ lia perfekta honorindeco, en nia rondo, ĉar lia karaktero estas tro „diametrala“ al la via. La saĝa trankvilo de via maljuneco — (la mieno de Fabricio malheliĝas S-ino Ŝupeluso korektante) — de via vira matureco —

S-ro Ŝupeluso (flanken). Agneso, ne parolu sensencaĵon.

S-ino Ŝupeluso. Mankas nepre al tiu pasia, furioza —

S-ro Ŝupeluso. Junulo, vi certe volas diri. Nu, li estas elkreskinta junulo kun siaj tridek jaroj. (Al Fabricio.) Pardonu al mi, sinjoro fabrikanto. (Fabricio kliniĝas kontraŭ li. S-ro Ŝupeluso alportas de la malgranda tablo, staranta inter la fenestroj, kesteton kun cigaroj kaj cindrujon. Metante ambaŭ objektojn sur la tablon, al Fabricio.) Ĉu vi fumus havan-cigaron, sinjoro?

Fabricio. Ha, dankon, mi ne estas kutimfumanto, sinjoro Ŝupeluso. Mi ankaŭ timas, ke mia fumado povus esti malagrabla al niaj sinjorinoj.

S-ro Ŝupeluso. Miaj sinjorinoj, inkluzive de onklino Terezo, ne konas min alia ol kun pipo aŭ cigaro en la buŝo. Iom pli aŭ malpli da fumo, kion tio faras? Tamen laŭ plaĉo.

S-ino Ŝupeluso. Kara Henriko, estas ja ĝuste, ke ni jam de longe kutimiĝis al via fumado,

kaj mi volas esperi, ke ĝi ankaŭ al vi mem neniel malutilis. Sed rigardante miajn brilblanke lavitajn kurtenojn, doloro min ekkaptas. — Ho, kiel malmulte da edzoj konsideras en tiu rilato la sentadon de siaj edzinoj. Ja, ja, nur malmultaj viroj ŝatas la poetan vorton: „Venu dolĉe renkonte al la virinoj". Sed vi, sinjoro fabrikanto, vi estas escepto de la regulo.

Fabricio (iom embarase). Ha, vi — al vi plaĉas — (De maldekstre alvenas **Gertrudo**.)

Sceno kvina

Gertrudo. Bonan vesperon.

S-ro Ŝupeluso. Bonan vesperon, knabineto.

S-ino Ŝupeluso. Bonan vesperon, Gertrudo.

Onklino Terezo. Bonan vesperon, Gertrunjo,

Fabricio (kiu leviĝis kaj sin klinis). Bonvolu, fraŭlina moŝto, ricevi samtempe kun mia saluto la esprimon de mia ĝojo pri via floranta mieno. Favora fraŭlino plijuniĝas videble.

Gertrudo (ridante). Se tio estas vera kaj daŭra, sinjoro fabrikanto, mi ja devus promenadi kiel lernejulino post dek jaroj.

Fabricio (iom embarase). Ha, al vi plaĉas ŝerci.

Gertrudo (sufiĉe grave). Estas ankoraŭ mia

devo, ke mi danku al vi, sinjoro fabrikanto, pro la rozbukedo, kiun vi afable oferis por mia sensignifa persono.

Fabricio. Sensignifa persono! — Plej favora fraŭlino, mi insiste petas vin, ne tion diri! (Enamiĝe.) Ha, ĉe tiom da amĉarmeco — tiom da — ha — plej ĉarma virgeco — ha —

(De dekstre eniras sinjoro **Altmonto** en fantazia vestaĵo, estante Stefano alivestiĝinta kaj kun falsaj barbo kaj hararo.)

Sceno sesa

Altmonto (patose).

Ho, ĝoja tago, kiu al amiko,
De longe ne vidita, min kondukas!
Mi nun forgesas la malbonan sorton,
Dankante ĉiujn diojn de l'ĉielo.
Al mia brusto venu, ho amiko,
Por ke mi ĝuu la revidan ĝojon!

S-ro Ŝupeluso (flanken). Tia sentaŭgulo! parolas verse! Tion mi ja ne povas. (Li formetas la cigaron kaj marŝas iom pezece kontraŭ Altmonto, kiu etendas siajn brakojn. Sinjorino Ŝupeluso, onklino Terezo kaj sinjoro Fabricio esprimas ekstreman miron. Gertrudo rigardas esplorante Altmonton.)

S-ro Ŝupeluso. Bruno Altmonto, ĉu mi vere vin ekvidas? — Ja, ja, ĉi tiu frunto, la okuloj

hele brilantaj, la akre modelita nazo ankaŭ igas vin klare ekkoni de mi. Sole via belega plenbarbo mankis, kiam malĝoja sorto vin forŝiris, ho tiel subite, el la amika rondo. Plej kara el ĉiuj miaj junecamikoj, kie vi tiel longe restadis? — Sed venu, lasu vin ĉirkaŭpreni!

(Ili ĉirkaŭprenas unu la alian, Altmonto apogante sian kapon je la brusto de Ŝupeluso. Post mallonga paŭzo li sin liberigas el la brakoj de Ŝupeluso kaj parolas patose kun ekvido suprenturnita.)

Altmonto.

Neniu lando, kiun mi ne vidis;
La marojn ankaŭ ofte mi traplugis,
De ŝip' majesta kapitan' fiera.
Aliaj celoj ĉiam min allogis.
Sed, ho, nenio indas ja la hejmon
Kaj tion, kion ĝi memori igas.
Sidante sur trezoroj miaj, ofte
Mi tiam pensis pri la belaj tagoj,
En kiuj ŝi, la ĉarma knabineto,
Dediĉis sin al mi per kora amo.

S-ro Ŝupeluso. Kara amiko, mi estas ekstreme kortuŝita. Ankoraŭ mi miregas pri ĉi tiu vere fabela renkonto. Dum preskaŭ tridek jaroj vi estis malaperinta, por nun ekstari kvazaŭ fantomo antaŭ mi, kaj tio en ĝoja festotago. Tial forpelu almenaŭ provizore

viajn melankoliajn pensojn, partoprenante en nia ĝojo. — Venu, Bruno, ke mi konatigu vin kun mia familio kaj la gastoj. (Altmonto serioze ekbalancas la kapon. S-ro Ŝupeluso kondukas lin al sia edzino.) Ĉi tie vi ekvidas mian edzinon Agneso, kiu fidele akompanis min tra la vivo dum dudek kvin jaroj kaj kvarono.

Altmonto (solene, kun kliniĝo, prezentante la manon al sinjorino Ŝupeluso, kiu leviĝis.)

Benita estu, kara sinjorino,
Je virtoj riĉan edzon havas vi.
Ekvidu min kliniĝi respektplene,
Edzinon de li indan honorante.

S-ino Ŝupeluso (leviĝante kaj embarase). Vi flatas min, sinjoro. (Flanken.) Domaĝe, ke mi ne trovis pli bonan respondon.

(Dume sinjoro Ŝupeluso kondukis Altmonton al Gertrudo, kiu leviĝas. Ŝi vidigas strangan embarason.)

S-ro Ŝupeluso. Nia filino Gertrudo, sola infano, la juvelo de mia koro, havanta dudek kvar jarojn malpli dekok tagojn.

Altmonto (ameme rigardante ŝin, kun emocio).

Ĉu eble estas? — Ĉu la fianĉino
De iam reviviĝis nun en vi?
Denove, ho, mi sentas la katenojn,
Por mi forĝitajn de la belulin'.

(Tra la korpo de Gertrudo iras tremeto. Ŝi levas la kapon, ĝis nun terendirektitan, kaj rigardas emocie la okulon de Altmonto.)

La samaj brunokuloj brile lumas,
Du steloj, en la nokto de la kor',
Renovigante ĉiujn la turmentojn,
De sort' maldolĉa destinitajn, ve! —
La samajn buklojn devas mi ekvidi,
Simila estas via kresk' al ŝia. —
Ho, ke miraklo nun okazi povu,
Ke estu viro juniĝanta mi, —
En vi mi tiam volus tiun vidi —
Fariĝu amotino amitin'!

(Li etendas siajn brakojn kontraŭ Gertrudo, tiam pasie.)

Vin lasu do nun ĉirkaŭpreni, kara;
Min juna, ho, denove faru vi,
Ke post la vintrotempa malamego
Printempon dolĉan ĝuu mia koro!

(Gertrudo, nur pene retenante la larmojn, montras movon, kvazaŭ ŝi volus ĵeti sin al la brusto de Altmonto. Tiam ĉi tiu subite mallevas la brakojn kaj forturniĝas kontraŭ onklino Terezo, la vizaĝon teren direktante.)

S-ino Ŝupeluso (eltirante sian poŝtukon, por ĝin premi antaŭ la okulojn, duonlaŭte). Tio ja estas plorinde kortuŝanta.

Onklino Terezo. Sed mia plej kara sinjoro Altmonto, kial do vi ne povis edziĝi kun

via fianĉino aŭ amitino? Ĉu vi havis pli favoritan amkonkuranton?

S-ro Ŝupeluso (iom embarase). Tiu ĉi sinjorino estas onklino Terezo.

Altmonto (serioze kliniĝante antaŭ ŝi).

Mi tian sinjorinon bone konis,
Ŝin nomis tiel junaj kaj maljunaj.

Onklino Terezo (flanken). Kio? — Ŝajnas, ke ni ĉiuj jam unu fojon ekzistis. — Plej strange! (Laŭtvoĉe.) Estis do mia antaŭulino. Sed, sinjoro Altmonto, mi demandis vin pri la kaŭzo de via rifuziĝo.

Altmonto.

Doloron la demando al mi faras.
Mi tamen tuj respondos; do aŭskultu:
Kontenta tute pri mi la patrino
De mia kara fianĉino estis;
Sed ties patro, ve, la monamanto,
Postulis, ke ŝi kun maljuna viro,
Estanta riĉegulo, edziniĝu.

(Fabricio moviĝas iom maltrankvile sur sia seĝo.)

S-ro Ŝupeluso. Jes, jes; nenio estas pli valora ol la ĝusta konado de homoj kaj agoj. — Sed vi, karega amiko, ne estu plu malĝoja pro tio, kio okazis en la estinteco. — Venu, vi devas ankoraŭ konatiĝi kun tiu ĉi sinjoro. (Li paŝas kun li al Fabricio.) Sinjoro fabrikanto Fabricio.

Altmonto (kun plej granda miro).
Ĉu Fabricio, Fabricio vi
Dirinta estas? — Ve, ke ĉiam ree
Mi devas aŭdi la malaman nomon!
Fabricio (kolerete). Sinjoro —
Altmonto (farante per la mano rifuzan movon kaj fikse rigardante Fabricion). Ĉu vi ĝin povas ĵuri, al mi diru —
Fabricio. Sinjoro, vi kondutas iom strange.
Altmonto. Ke vi ne tiu Fabricio, estas,
(pli laŭte) Jes tiu, kiu ŝtelis de mi ĉiom
(Ankoraŭ pli laŭte.) Da kortrezoroj karaj?! — Vi paliĝas?!
Fabricio (tremante). Si — in — jo — ro — al — mi — vi — estas —
Altmonto.
Jes, jes, mi estas li kaj venis nun,
Por venĝi min —; la sorto ĝin destinis.
Fabricio. Vi estas sen — s — —
Altmonto. Silentu, ja nenio vin utilos.
(Li ekkaptas Fabricion per unu mano je la brusto, per la alia je la hararo.)
Fabricio. Li estas frenezulo! — (Li sin forŝiras.) Helpu! (Li rapidege forkuras dekstren, sen peruko, kiun Altmonto havas en la mano.)

Sceno sepa

Altmonto (faligante la perukon sur sian seĝon, flanken). Mil diabloj, tion mi ja ne volis! —

Kion nun? — (Li staras kvazaŭ mediteme. Gertrudo komencas ridi, unue mallaŭte, poste pli forte.)

S-ino Ŝupeluso (kvazaŭ vekiĝinte el rigidiĝo, tre indigne). Ne, estas vere abomene. Promenas tiu sinjoro antaŭ la homoj kun falsa hararo. Se mi estus sciinta tion —

S-ro Ŝupeluso. Tio estas aneksi la rajton de virina sekso. Vere nepardoneble. Nu, de sinjoro Fabricio ni liberiĝis por ĉiam. Li neniam revenos al ni, nek kun, nek sen hararo.

Onklino Terezo. Danku ni Dion! Ĉar lia amo al Gertrudo estis sendube ĝuste tiel falsa kiel liaj haroj.

S-ino Ŝupeluso (ektimigite). Ho Dio, ĉu vi opinias?

Altmonto (vekiĝinte el sia meditemeco, certece).

Postulas repacigon mia kulpo;
Do kion mi ĵus faris kontraŭ li,
Mi mem suferi volas libervole,
Hararon mian falsan kaj la barbon
Nun de mi forŝirante.

(Li forŝiras siajn perukon kaj barbon.)

Gesinjoroj,
Mi vin salutas, la memulo ree.

(Stefano staras sur la scenejo.)

S-ino Ŝupeluso. Ki—i—o estas tio?

(Onklino Terezo kunfrapas mirege la manojn. Gertrudo alpaŝis al Stefano. Iliaj manoj kuniĝas.)

S-ro Ŝupeluso (kun indeco). Tio, mia karega Agneso, estas la fame konata aktoro sinjoro Stefano, kiu ĵus ludis gastrolon, kiel pruvon de sia eminenta povado. Admirinte lian ludon, vi plezure aŭdos, ke la direkcio de la „Lobe-Teatro“ en Breslau, arta instituto de alta graveco, prezentis al sinjoro Stefano tre honorindan, bone pagatan scenejan oficon.

Gertrudo (duonvoĉe al Stefano, per karese riproĉa tono). Kaj kontraŭ mi vi tute silentis. (Stefano ridetas.)

S-ino Ŝupeluso (duonvoĉe). Ho, vere? — Estas ja agrabla sciigo.

Onklino Terezo. Mi ankaŭ tion opinias.

S-ro Ŝupeluso (humormaniere). Nu, sinjoro Stefano samtempe kun tio sciigis al mi, ke li estas preta, akcepti la oficon, se li povos kunpreni karan rememoron pri sia hejmo. Kaj ĉar li kredas, ke ĉio aminda ĉi tie korpiĝas por li — esceptinte sian patrinon — en — en certa fraŭlino, kiun mi — ne, mi volis diri, ke vi — vi — mil diabloj, mi vere konfuziĝas. Sinjoro Stefano, bonvolu fini!

Stefano (stariĝante antaŭ sinjorino Ŝupeluso post respektplena kliniĝo).

En malproksimon donu la filinon,
Ho, por la vivo donu ŝin al mi,
Por ke elkresku el penado mia
Plej nobla ĝojo kaj ĝuad' al ŝi.

Ĉe flanko ŝia mi kuraĝe volas
Penadi ĉiam pro altega cel';
Jes, ekscitota per favoro ŝia
Mi hele brilos sur la artĉiel'.

Gertrudo (mallaŭte al la patrino). Patrino — kara patrino — ni amas unu la alian tiel korege — tiel arde —

S-ino Ŝupeluso (rigardinte afable ilin ambaŭ). Mi eraris. Nun mi vidas ree klare. — Estu feliĉaj, miaj infanoj. (Ŝi ekkaptas iliajn manojn.)

Gertrudo (ĵetante sin al la patrina brusto). Dankon, ho, dankon al vi, kara patrineto. (Dume Stefano respekte kisis la manon de sinjoro Ŝupeluso.)

S-ro Ŝupeluso (alirante). Havu ankaŭ mian benon. (Li prenas la manojn de Gertrudo kaj Stefano.)

Gertrudo (mallaŭte). Plej bona el ĉiuj patroj, kiel mi estas feliĉa! (S-ro Ŝupeluso karese frapetas ŝian kapon.)

Onklino. Mian plej bonan gratulon! (Ŝi donas la manon al Stefano kaj kisas Gertrudon.)

Sceno oka

(**Karlino** eniras de dekstre. Ŝi alportas pleton kun punĉujo kaj glasoj.)

Karlino. Nu, mi ĵus alvenas en ĝusta tempo kun la punĉo. (Kliniĝante antaŭ la gefianĉoj.) Mi gratulas ankaŭ plej bone!

Fino.

Esperanto-Verlag
Ellersiek & Borel G. m. b. H.
Berlin kaj Dresden

Du gravaj verkoj

de Dro Edmond Privat

Kursa Lernolibro

laŭ praktika parola metodo
4a eldono, 13a—17a miloj.

Prezo (fundamenta) **0.80 M** (× ŝlosilnombro) = **0.80 Fr.** svis.

Karlo

Originala rakonto. Kun antaŭparolo de Marie Hankel. Facila legolibro por infanoj.

Prezo (fundamenta) **0.50 M** (× ŝlosilnombro) = **0.50 Fr.** svis.

Esperanto-Verlag
Ellersiek & Borel G. m. b. H.
Berlin kaj Dresden

L. L. Zamenhof

Ekzercaro

eltirita el

Fundamento de Esperanto

3a eldono (6a—10a miloj)
Fund. prezo **0.30 M** (× ŝlosilnombro)
Por bonvalutoj landoj **0.30 Fr.** svis.

Ĉi tiu fundamenta verketo de nia Majstro ne bezonas specialan rekomendon. Ĝi estas unu el la plej bonaj helpiloj por komencantoj, kiuj volas perfektigi sin en Esperanto.

Esperanto-Verlag
Ellersiek & Borel G. m. b. H.
Berlin kaj Dresden

Wilhelm Fricke

Universala Legolibro

Modelaj tradukaĵoj el la tutmonda literaturo kaj originalaĵoj Esperantaj

Fundamenta prezo **1,50 M** (× ŝlosilnombro laŭ prezolisto). Por bonvalutaj landoj 1,50 Fr. svis.

176-paĝa legolibro, kiu ne nur egalvaloras aliajn, jam ekzistantajn, sed kelkarilate eĉ superas ilin. Ĝi enhavas nur modelajn legaĵojn en poezio kaj prozo de bonaj Esperanto-verkistoj, nome 66 tradukaĵojn el la literaturo de la tuta mondo kaj 24 originalaĵojn en Esperanto. S-ino *Marie Hankel* skribis pri ĝi jenon:

„La Universala Legolibro de W. Fricke estas treege rekomendinda. Ĝi anstataŭos la malnovan, jam ne haveblan Krestomation de Zamenhof, ĉar ĝi enhavas poeziajn kaj prozajn legaĵojn el multaj diversaj lingvoj kaj landoj. Tuj post finita kurso la instruisto rekomendu la libron al la lernantoj; ili legu, traduku kaj lernu parkere. Dum grupokunvenoj ili rakontu tion, kion ili legis pro ekzercado. La elekto estas bonega, la tekstoj estas ĉiel senriproĉaj kaj fundamentofidelaj. La aŭskultantoj estos kontentaj kaj volonte ankaŭ aĉetos la interesan libron."

Parton de sia honorario por ĉi tiu verko la aŭtoro destinis por la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko.

Druck: Möller & Borel G. m. b. H., Berlin SW 68.

Nova Esperanto-Biblioteko

a) Pri la mondmilito

No. 1. **La kulpo de Entente.** Konciza resumo kunmetita el oficiala materialo.

No. 2. **La efikoj de la U-boata milito.** Laŭ oficialaj elmontroj el komenco de Aŭgusto 1917.

No. 3/4. **La granda mensogo.** Traduko de la angla broŝuro „Tsardom's part in the war" de E. D. Morel.

b) Bela literaturo

(Ĉiuj volumoj estas bele kartonitaj)

No. 5. **Argus: Pro kio?** Internacia kriminalromano originale verkita.

No. 6. **Heine,** Heinrich: **Elektitaj Poemoj.** El germana lingvo tradukis Friedrich Pillath. Dua, kompletigita eldono.

No. 7. **William,** P.: **Legolibro.** Ia volumo: Internacia Anekdotaro.

No. 8. **Hauff,** Vilhelmo: **La kantistino.** Novelo. El germana lingvo tradukis Eugen Wüster.

Nr. 9. **Lessing,** Gotthold Ephraim: **Natan la Saĝulo.** Drameca poemo en kvin aktoj. El germana lingvo tradukis K. Minor.

Nr. 10. **Elin-Pelin: Elektitaj Rakontoj kaj Prozversaĵoj.** El la Bulgara tradukis Ivan H. Krestanoff. (En preparo.)

Prezoj laŭ nia plej nova katalogo.

(La kolekto estas daŭrigota.)

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H.

Berlin kaj **Dresden**

III-C-3/4

ESPERANTA BIBLIOTEKO [redacted]

Ĝis nun aperis [redacted]

No. 1. Legolibreto, de J. Borel.

No. 2. Fabeloj de Andersen, tradukitaj el dana lingvo de Fr. Skeel-Giörling.

No. 3. Bona Sinjorino, novelo de E. Orzeszko, tradukita el pola lingvo de Kabe.

No. 4. Rusaj Rakontoj, de Mamin Sibirjak, tradukitaj el rusa lingvo de N. Kabanov.

No. 5. Don Kihoto en Barcelono, tradukita el hispana lingvo de Fr. Pulujà y Vallès.

No. 6. El la Biblio, trad. Dro L. L. Zamenhof.

No. 7. El Dramoj (fragmentoj), tradukitaj el germana lingvo de Dro L. L. Zamenhof.

No. 8. El Komedioj (fragmentoj), esperantigitaj de Dro L. L. Zamenhof.

No. 9. Praktika Frazaro. Dialogoj de la ĉiutaga vivo, kunmetis J. Borel.

No. 10/11 (duobla numero). **Japanaj Rakontoj.** El Japana lingvo kunmetis Ĉif Toŝio.

No. 12. Reaperantoj. Familia dramo de Henrik Ibsen (1a aktoj), trad. el norvega lingvo de O. Bünemann.

No. 13. Bulgaraj Rakontoj, el bulgara lingvo tradukis At. D. Atanasov.

No. 14/15 (duobla numero). **Amoro kaj Psiĥe** de Lucius Apulejus, el latina lingvo trad. Emilo Pfeffer.

No. 16. Komerca Korespondo, kunmetis J. Borel.

No. 17. Konsiloj pri Higieno, tradukis J. Borel.

No. 18. L[redacted] de la Ora Rivero [redacted] Ruskin, el la angla [redacted] tradukis Ivy Kellermann, A. M., Ph. Dr.

No. 19. Sinjoro Herkules. Unuakta burleskaĵo de Georg Beltiy, el germana lingvo tradukis H. Arntz kaj M. Butin.

No. 20. La lasta Usonano de J. A. Mitchell, el la angla lingvo trad. Lehm. Wendell.

No. 21. Hungaroj Rakontoj de Ferenc Herczeg, el hungara lingvo trad. A. Panajott.

No. 22. Nord-germanaj Rakontoj de Heinrich Bandlow, el platgermana lingvo tradukis Ella Scheerpeltz.

No. 23. Hispana Dramoj de Jacinto Benavente, tradukis Vicente Inglada.

No. 24. La Instituto Milner de Jean Jullien. Trad. el franca Lingvo la Lyon-a grupo.

No. 25. Novcletoj el la Nigra Arbaro de Hel. Christaller. Trad. el germana lingvo Wilh. Christaller.

No. 26. La intervidiĝo kaj Nekonita Dialogo de Alfred de Vigny, el franca lingvo trad. Sam. Meyer.

No. 27. La Patrino de E. Zahn. El la Germana trad. J. Ŝmid.

No. 28. Elzasaj Legendoj. El germana lingvo tradukis Charlotte Pulvers.

No. 29/31 (triobla numero). **Sub la Neĝo.** Taglibro de juna loĝanto de la Jura-montaro de J. J. Porchat. El la Franca trad. J. Borel.

Prezo laŭ nia plej nova katalogo. La kolekto estos daŭrigota. Kelkaj numeroj estas provizore elĉerpitaj, sed ili estos represataj unu post la alia.

Ĉiu libreto enhavas 40—50 paĝojn

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel GmbH., Berlin kaj Dresden

Presejo de Möller & Borel G. m. b. H., Berlin SW 68, Lindenstr. 18/19